BIBLIOTHÈQUE LA CHAUX-DE-FONDS
Li SVI

Svisa Esperanto-Societo
Poŝtfako 779
CH-2301 La Chaux-de-Fonds
Tel.: (039) 26 74 07

Majo 1990

# SVISA ESPERANTO-SOCIETO INFORMAS

## KOTIZOJ 1990

Ĉimonate vi ricevas inviton kotizi por la jaro 1990-a.

**Membrokotizoj** (inkluzivas abonon al **Svisa Esperanto-Revuo** kaj al la cirkulero **Svisa Esperanto-Societo informas**) jare estas SF 50.- (infanoj kaj geknaboj ĝis 18 jaroj: SF 5.-; junuloj ĝis 26 jaroj: SF 30.-; pensiuloj: SF 30.-; geedzoj: SF 75.-; geedzoj pensiulaj: SF 45.-
**Poŝtĉekkonto:** 80-737-9 Schweiz. Kreditanstalt, Zürich-Rigiplatz (por la konto 653677-40 Svisa Esperanto-Societo).

Ni dankas al tiuj, kiuj jam pagis sian kotizon por 1990. Ĉar estas al ni neeble distingi en tiu ĉi sendaĵo, ĉu ni devas aŭ ne aldoni poŝtpagilon, tial troviĝas po unu en ĉiu koverto. La jam kotizintoj ne uzu ĝin aŭ konservu ĝin por foje fari donacon al SES.

Nekotizintoj ĉesos ricevi la organojn de SES.

Dum la printempaj kaj someraj monatoj ne aperos SER. Sed vi sciu, ke pretiĝas temaj numeroj. Ni esperas, ke ekde la aŭtuno la unuaj povos aperi.

**Renkontiĝoj**
En la kursprogramo, kiun vi ricevis komence de la jaro, ni anoncis la semajnfinon de la 26-27-aj de majo, dum kiu Pierre BABIN rakontos pri la historio de Kastelo "Grésillon". Ripete ni ree atentigas vin pri tiu renkontiĝo, kiu ebligos konatiĝi kun kuraĝulo, al kiu nia movado multon ŝuldas.

**Aldonaĵoj**
El Budapeŝto vi ricevas invitilon al esperanto-lingvotendaro, el Dagestena Esperanto-Centro (Sovetio) 2-an informleteron pri alia tendaro. Eble sviso riskos vojaĝon ĝis Balatona Lago aŭ eĉ Kaspia Maro. Ni atendas kun intereso raporton pri tiu esperanto-travivaĵo. La svisaj baha'anoj pli kaj pli esperantiĝas kaj organizos prelegsemajnfinon, kiun ili jam nun anoncas.

Pluraj SES-anoj esprimis sian ĝojon trovi tiujn anoncilojn aldone al nia cirkulero. Kontraŭe Nilkaus WEISS plendis pri tro da papero. Estas malfacile kontentigi ĉiujn. Ni provas diskonigi kiel eble plej multe da okazaĵoj, ke ili instigu plurajn al la praktiko de esperanto kun nesamlingvanoj.

En la momento fintajpi tiun ĉi cirkuleron ni ricevas anoncilon de Lucerna Esperanto-Societo, kiu ankaŭ venas riĉigi nian informadon pri okazontaĵoj.

**Rememorigo pri juniaj aranĝoj okazontaj en La Chaux-de-Fonds**
**28 majo - junio:** ESPERANTO-STAĜO.
**2-4 junio (Pentekosta plilongigita semajnfino):** STUDA SEMAJNFINO PRI ARBARO.
**4-9 junio (Postpentekosta semajno):** SEMINARIO PRI LA NOMOJ DE SOVAĜAJ PLANTOJ kaj ESPERANTO-STAĜO.
**18-23 junio:** ESPERANTO-STAĜO.
**23-24 junio:** STUDA SEMAJNFINO

**Sam-semajnfine okazos Jes-renkontiĝo en Estavayer-le-Lac borde de Lago Neuchâtel.** Ni estas ĝojaj konstati, ke reviĝliĝas Junularo Esperantista Svislanda. Ni deziras plenan sukceson al tiu kunloĝado, kiel diras la japanaj esperantistoj.

Via prezidanto Claude GACOND

Kultura Centro Esperantista
kaj
Svisa Esperanto-Societo
invitas vin al la

regiona
KULTURA SEMAJNFINO
LA CHAUX-DE-FONDS
Kultura Centro Esperantista
(strato Postiers 27, tel. (039) 26 74 07)

26-27 majo 1990

prelegos
Pierre BABIN
direktoro de la Kulturdomo Kastelo "Grésillon"

**Horaro:**
**Sabate 26-an de majo:**
14h00:malfermo de la akceptejo
15h00-16h30: malfermo, prelegoj kaj studo
16h30-17h00: teumo
17h00-18h00: prelegoj kaj studo
18h30: vespermanĝo
20h00-22h00: komuna amika vespero

**Dimanĉe 27-an de majo:**
08h00: matenmanĝo
9h00-10h30: prelegoj kaj studo
~~10h30-11h00: kafumo~~
11h00-12h00: prelegoj kaj studo
12h30: tagmanĝo
14h00-15h30: Promenado en la paŝtejoj
16h00: fermo kaj adiaŭa teumo

Por la prelegoj kaj studo la partoprenantoj dividiĝos en 3 rondoj laŭ sia lingvo-nivelo.
**La elementa klaso** (tutkomencantoj) ekintimiĝos kun esperanto helpe de nia tre taŭga **aŭd-vida enkonduka kurso**, kiun gvidos Jean-Jacques LAVANCHY.

**La meza grupo** (komencantoj) faros **paroligajn ekzercojn** kun Klara MIKOLA (hungarino).

**La supera rondo** (progresantoj kaj lertuloj) intimiĝos kun **la granda aventuro de la kastelo "Grésillon" kun Pierre BABIN, unu el la fondintoj de tiu kulturdomo.** Kun li ni travivos pli ol kvardekon da jaroj kulture decidigaj por esperanto. (Kun prezento de lumbildoj pri la bieno kaj pri la vivo en Grésillon). (Pierre BABIN naskiĝis la 18-an de oktobro 1919 en Luçon (Vendée), instruis la anglan lingvon en mezlernejo kaj liceoj de 1945 ĝis 1969. Nomumita inspektoro pri instruado de lingvoj en 1970. Emeritiĝis en 1981. Esperantiĝis en 1947 kaj ludis ĉefrolon en la fondo kaj vigligo de la Kastelo Grésillon.)

**Aliĝo:** Sendu kiel eble plej rapide skribe aŭ telefone vian aliĝdeziron, donante la ĉisekvajn sciigojn: a) familian nomon; b) individuan nomon; c) naskiĝjaron; d) kompletan adreson; e) telefonnumeron. Samtempe ĝiru antaŭpagon de SF 25.- al la poŝĉekkonto 23-2921-8 Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, kun la indiko: aliĝo al la semajnfino de la 26-27 majo.

**Prezoj:** Tuta aranĝo (programo, manĝoj, tranoktado, vespero, ktp) kostas kun tranoktado en ĉambro kvarlita: SF 90.-; 2-lita: SF 100.-; 1-lita: SF 120.- Prezreduktoj por familioj, grupoj: 10% kaj studentoj: SF 10.-

ESPERANTO-SEKCIO EXPRESS BUDAPEST

K O R E
I N V I T A S
V I N

al la "hungara maro"
B_A_L_A_T_O_N_O

por partopreni nian tradician

**ESPERANTO-LINGVOTENDARON**

okazonta inter 06-13-a de julio 1990.

en kampadejo Kiliántelep.

Ĝi certigos al Vi, al viaj familianoj, al viaj geamikoj
- altnivelan lingvoinstruadon /en diversaj gradoj/
- riĉan, varian distran programon
- belajn somerajn tagojn en agrabla ĉirkaŭaĵo por ripozi, refreŝiĝi.

P a r t o p r e n k o t i z o j :

| | | |
|---|---|---|
| Lingvotendaro Esperanto por Bazlernejanoj LEB | Ft 4.200.- | Nlg 175.- |
| Lingvotendaro Esperanto por Mezlernejanoj LEM | Ft 4.700.- | Nlg 195.- |
| Lingvotendaro Esperanto por Plenkreskuloj LEP | Ft 4.950.- | Nlg 210.- |

**NE HEZITU, PLENUMU LA APUDAN ALIĜILON KAJ RESENDU AL NIA ADRESO:**

Esperanto-Sekcio de Vojaĝoficejo "EXPRESS"
H-1395 Budapest 62, pk. 567.
ĝis 20-a de majo 1990.




La partoprenkotizon pagu:
"OKHB 214-10648 Express
Utazási Iroda Eszperantó"

Pli detalajn informojn ni volonte servas /tel.: 132-39-45/, kun aliaj turismaj informoj, servoj ni ĉiam staras je via dispono!

Ankaŭ Vi estu inter niaj karaj gastoj!

Esperanto-Sekcio de
Vojaĝoficejo "EXPRESS"
Budapest-Hungario

Elizabeta Gombkötő
sekciestrino


ESPERANTO-SEKCIO de
Vojaĝoficejo "EXPRESS"

Budapest V. Szabadság tér 16.
H-1054 Hungario
Tel.: 132-39-45
131-77-77/22.


ESPERANTO-SEKCIO EXPRESS BUDAPEST

## A L I Ĝ I L O

al ESPERANTO-LINGVOTENDARO en KILIÁNTELEP 1990

Nomo: .........................................................................

Adreso: .......................................................................
..................................................................................

Lando: ..............................

Naskiĝdato: ..........................

Profesio:...................................

En kiu kategorio Vi aliĝas: LEB
LEM
LEP

Vi volas viziti kurson : A B C kategorian.

Pagmaniero: ...............................................................

Rimarko: .....................................................................
..................................................................................

Dato:

..........................................
subskribo

# Dagestana Esperanto-centro Invitas

DAGESTANA
ESPERANTO-CENTRO

DAGESTANA FILIO DE
SOVETA-BRITIA FIRMAO
"ENERGOINFORMATIKA"

## INFORMLETERO N2

*pri la 1-a Internacia Tendaro Esperantista Maramika 1990*, **Julio 1-10**

Karaj gesamideanoj!

La 1-a ITEM okazos ĝuste sur bordo de Kaspia maro en pitoreska kaj ekzotika montara regiono - Dagestano. La aranĝo havos ripozan kaj edukan karakteron. Ĝia programo konsistas el:

-matena gimnastiko, marnaĝado, sunbruniĝado;
-diversgradaj lingvokursoj de Esperanto;
-autobusaj ekskursoj al urboj Maĥaĉkala kaj antikva 5-miljara Derbento;
-tendaraj fajroj, esperantaj ludoj, diskotekoj;
-tago de Neptuno k.t.p.

**ESPERANTO ESTAS PRAKTIKEBLA DE FRUMATENO ĜIS NOKTOMEZO!**

Por aliĝi necesas plenigi la aliĝilon kaj sendi ĝin al adreso: USSR, SU-367013, Maĥaĉkala-13, abon. jaŝik 11, E-centro.

La partoprenkotizo inkluzivas loĝadon en 2-3 litaj ĉambroj, manĝadon kaj partoprenon en la programo kaj egalas:

| | Soclandoj | Nesoclandoj |
|---|---|---|
| ĝis la 15-a de Majo: | 150 rublojn | 90 US-dolarojn |
| ĝis la 30-a de Majo: | 160 rublojn | 100 US-dolarojn |
| ĝis la 15-a de Junio: | 170 rublojn | 110 US-dolarojn. |

La dato de aliĝo oni kontrolas laŭ poŝta ŝtampo. Pagi surloke.

La unua servo (matenmanĝo) okazos la 1-an de Julio kaj la lasta (tagmanĝo) - la 10-an de Julio. Dezirantoj rajtas daŭrigi ripozon en belega montaro, pagante aldone surloke. La registrado okazos jam de la 30-a Junio laŭ adreso: Maĥaĉkala, Kalinina 70, Politeĥniĉeskij institut, "Energoinformatika". De tie vi veturos per speciala buso ĝis la marripozejo.

Por atingi la lokon vi devas veturi ĝis Moskvo aŭ Kievo kaj de tie ĝis Maĥaĉkala per trajno aŭ aviadilo. Laŭ via ne malpli ol unumonata telefona au telegrafa peto ni povus rezervi por vi bileton por trajno de Moskvo ĝis Maĥaĉkala. Vi devas esti en Moskvo jam la 29-an de Junio matene.

Por urĝa kontakto bv. uzi telefonojn:
7-41-01 (hejma) - Timur Aliev
7-00-32 (hejma) - Vladimir Abramov.
Telefonkodo de Mahackala estas - 872.

Ni atendas vin!

Organiza komitato

## A L I Ĝ I L O

Mia familia nomo: S-ro/S-ino* ____________
Propra nomo: ____________ Naskiĝdato: ____________
Preciza adreso:
strato: ____________ N-ro ____________
Urbo: ____________ Poŝta kodo ____________
Lando ____________ Telefonnumero ____________
Mi bezonas personan invitilon jes/ne*
Mi bezonas oficialan leteron jes/ne*

**** - BONVOLU FORSTREKU LA NEDEZIRATAN VORTON!***

RIMARKO: Laŭ neceso vi rajtas multobligi la aliĝilon. Se vi bezonas oficialan leteron, bv. skribu al kies nomo, adreso ĝi devas esti, proksimuma enhavo.

***DATO:*** ____________



| 1990-10-28 | **dimanĉo - Sonntag** |
|---|---|
| 07.30 - 08.00 | meditado - Meditation |
| 08.00- 09.00 | matenmanĝo - Frühstück |
| 09.00 - 10.30 | Ideoj pri venonta Monda Federacio<br>*H. Welger*<br>Ideen über eine künftige<br>Welt-Föderation |
| 11.00 - 12.30 | internacia juro<br>Internationales Recht<br>*H. Welger* |
| 12.30 - 14.00 | tagmanĝo - Mittagessen |
| poste /danach | forveturo - Abreise |




## KURSO 9021

**ESPERANTO SEMAJNFINO**

26.10.90, 18.00
28.10.90, 14.00

**Prelegoj:**

**K. Barkoviĉ**
Esperanto-Asocioj
kaj ties celoj

**H.D. Maas**
Internacia lingvo kaj paco

**H. Welger**
La Zamenhofa Humanismo
Indeoj pri venonta Monda Federacio
Internacia juro

**I. Hofmann**
Turnopunkto al Tutmonda Socio

**TEMO:**
Paŝoj al
Tutmonda Socio

Aliĝkotizo: Sfr. 50.-
(+ restadelspezoj laŭ prez-listo)

Aliĝo:
Landegg Akademie
CH-9405 Wienacht/AR
Svislando

Tel: 41-71 91 22 33

Sendube la homaro atingis historian turnopunkton. Pli kaj pli rapide la mondsituacio ŝanĝas kaj videblas la konturoj de nova tutmonda socio.

Dum tiu kriza horo de la homaro ni esploras - kune kun kompetentaj referantoj - la eblecojn formi internacian komunaĵon, kiu transiras naciajn suverenecojn. Kiuj barieroj krom la lingvaj devas esti forigotaj por realigi la unuecon de la homaro kaj Tutmondan Socion?

Fartu kune kun ni la unuajn pasojn!

Niemand kann heute mehr daran zweifeln, dass wir an einem geschichtlichen Wendepunkt angelangt sind. Immer rasanter verändert sich die Welt und unter unseren Augen zeichnen sich die Umrisse einer neuen Weltgesellschaft ab. In dieser kritischen Stunde der Menschheit untersuchen wir, gemeinsam mit kompetenten Referenten, die Möglichkeiten eine übergreifende, die nationale Souveränität überwindende Völkerordnung zu schaffen. Welche Barrieren ausser der Sprachbarriere, müssen noch überwunden werden, damit die globale Vernetzung der Menschheit Wirklichkeit werden kann?

Machen Sie mit uns die ersten Schritte!

## PROGRAMO - PROGRAMM

| | |
|---|---|
| **1990-10-26** | **vendredo - Freitag** |
| - 18.00 | alveno - Anreise |
| 18.30 | vespermanĝo - Abendessen |
| poste/danach | interkona kaj konversacia vespero<br>*K. Barkovič*<br>Kennenlernen und Gespräche |
| **1990-10-27** | **sabato - Samstag** |
| 08.00 - 08.30 | meditado - Meditation |
| 08.30 - 09.30 | matenmanĝo - Frühstück |
| 09.30 - 10.30 | Esperanto-Asocioj kaj ties celoj<br>Esperanto-Gesellschaften und ihre Ziele<br>*K. Barkovič* |
| 11.00 - 12.00 | Internacia lingvo kaj paco<br>Internationale Sprache und Frieden<br>*H.D. Maas* |
| 12.30 - 14.00 | Tagmanĝo - Mittagessen |
| 15.00 - 16.30 | La Zamenhofa Humanismo<br>Der Zamenhofsche Humanismus<br>*H. Welger* |
| 16.30 - 17.00 | posttagmeza kafo<br>Nachmittagskaffee |
| 17.00 - 18.30 | Turnopunkto al Tutmonda Socio<br>Wendepunkt zur Weltgesellschaft<br>*I. Hofmann* |
| 18.30 - 20.00 | vespermanĝo - Abendessen |
| 20.00 - 21.00 | diskutado - Diskussion<br>*I. Hofmann* |
| 21.00 - ..... | distra vespero - Unterhaltungsabend |

# LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO

akceptas kontraŭvizite niajn tiĉinajn samideanojn en Lucerno. Al tiu renkontiĝo ni tre kore invitas ankaŭ aliajn esperantistojn el Esperantujo.

Dato: Dimanĉo, 1-a de julio 1990

Renkontejo: Ĉe la enveturkajo de la tiĉina trajno, je la 10.47 h.

Programo:
1) Akceptado ĉe la enveturkajo de l' tiĉina trajno
2) Mallonga promenado kaj vizito de la akvoturo
3) Tagmanĝo en tradicia restoracio en la malnovurbo
4) Senpena promenado al la stacio del Gütschfunikularo
5) Vizito de la hotelo Gütsch por ĝui la belegan panoramon kaj por gaje kunesti
6) Ekveturo trajne de la tiĉina grupo je la 17.19 h.

Kostoj: Je propra konto

Aliĝo: Por povi bonorde organizi la renkontiĝon, ni bezonas resendon de la suba aliĝilo. <u>Tio ne necesas por la kolektiva tiĉina grupo!</u>

---

<u>Aliĝilo</u>

Nomo:__________________________ Antaŭnomo:________________

Mi venos trajne je la ______ horo el ____________________

Mi venos aŭtomobile: jes/ne

Bonvolu resendi ĝis ĵaŭdo, la 21-a de junio al:

Anĝelo Mellini, Büntacher 21, 5626 <u>Hermetschwil</u>

Koran dankon: la organizantoj